

# Flandra Esperantisto



VLAAMSE ESPERANTISTENBOND  
St. Klaradreef 59, BRUGGE




Tweemaandelijks Tijdschrift  
26e Jaargang

januari - februari 1960  
Nummer 1 (290)

**VAN**

**A**

**TOT**



**VAN ANGLIA TOT ZODIAC**

**ANGLIA DELUXE      PREFECT DELUXE**

Tweedeur                      Vierdeur

4 cyl. - 36 rem-pk - Taks: 6 pk

Verwarmings- en ontdooiingsapparaat standaarduitrusting

Betalingsmogelijkheden : tot 36 maanden

**BEANTWOORDT FORD AAN UW WENSEN**

**CONSUL**

4 cyl. - 59 rem-pk - Taks: 10 pk

In zijn klasse de enige wagen die plaats biedt aan 6 personen.

**ZEPHYR**

6 cyl. - 86 rem-pk - Taks: 13 pk

De ideale wagen voor beroepsbezigheden en het week-end.

**ZODIAC**

6 cyl. - 86 rem-pk - Taks: 13 pk

Zeer luxueuze uitvoering van de Zephyr.

Vraag zonder enige verplichting de brochure over de ganse reeks aan de officiële Ford-verdeler

**FORD**

**FORD SERVICE**



FORD MOTOR COMPANY (BELGIUM) N.V.

Rechtstreekse verdeler van Brugge en omstreken

**GARAGE CANADA**

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

Tel. 34611

*Flandra Esperantisto*

Eldono de FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

**REDAKCIO** : Drs. F. Roose, Sinte Klaradreef, 59, Brugge - Belgujo  
Tel. 319.81.

**VLAAMSE ESPERANTISTENBOND**

aangesloten bij **Universala Esperanto-Asocio**

**VOORZITTER** : G. Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.

**SECRETARIS** : G. Maertens, Prins Leopoldstraat, 51, Sint-Kruis  
Tel. 349.35.

**PENNINGMEESTER** : Mej. J. Terryn, Raapstraat, 74, Gent.

**UEA-VERTEGENWOORDIGER** :

Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan, 14, Blankenberge  
P.C. 4161.35.

**CORRESPONDENTIE-KURSUS** :

A. Van De Velde, H. Pirennelaan, 25, Gentbrugge.

**FLANDRA ESPERANTO INSTITUTO** :

Blankenbergse steenweg, 72, Brugge. P.C. 3268.51.

**Lidmaatschap :**

Leden : 100 F (met inbegrip van het tijdschrift)

Steunleden : 150 F (idem)

Inwonende leden : 25 F (met inbegrip van " De Esperantist ")

Jongeren : 50 F (onder de 21 jaar)

Abonnement : 75 F

**Postcheckrekening 2321.50**

van de Vlaamse Esperantistenbond te Gent.

**Tarief van de aankondigingen :**

(geldt alleen voor firma's, niet voor correspondentie-adressen)

1 bladzijde : 500 F (afmeting 20 x 12)

1/2 bladzijde : 300 F (afmeting 10 x 12)

1/4 bladzijde : 150 F (afmeting 5 x 12)

Daar het bedrag verschuldigd voor de aankondigingen die meerdere malen moeten verschijnen, gefactureerd wordt na het verschijnen der 1ste aankondiging, wordt op de voormelde tarieven de volgende vermindering toegestaan :

20 % voor een aankondiging die 3 maal wordt opgenomen.

30 % voor een aankondiging die 6 maal wordt opgenomen.

Verdere inlichtingen nopens de aankondigingen in het sekretariaat.



## Wat is UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO?

U.E.A., de " Universele Esperanto-Vereniging " is de enige internationale Esperanto-organisatie die zich het bevorderen van de taal Esperanto tot enig doel heeft gesteld. Ze wil alle alleenstaande krachten samenbundelen, ze wil de bekroning zijn van alle bonden en verenigingen die in beperktere kring zich wijden aan de verspreiding van het Esperanto, om één enkel machtig lichaam te vormen en als een vloedgolf de kortzichtige onverschilligheid of egoïstische tegenkantingen weg te spoelen die het officieel aanvaarden van de wereldhulptaal nog steeds in de weg staan.

Op 1 december 1959 telde U.E.A. meer dan 30.000 leden. Een niet onaanzienlijk getal voorzeker, en toch bijlange niet voldoende om te slagen in een wereld waar alles moet onderdoen voor de macht van de massa. Nog te veel esperantisten die het nochtans goed menen, houden zich afgezonderd in hun ivoren toren, geven er zich geen rekenschap van dat het niet volstaat voor een gedachte of een streven rechtvaardig, broodnodig en vanzelfsprekend te zijn om direct te zegevieren. In hun optimisme verwaarlozen ze hun solidariteit met de daad kracht bij te zetten en aan te sluiten: " het zal immers zonder hen ook wel gaan. " Helaas, neen, zonder hen zal het niet gaan, of toch zeker niet zo vlug als het wel wenselijk is.

Nochtans is er plaats voor iedereen in de schoot van U.E.A., waar geen onderscheid gemaakt wordt omtrent nationaliteit, ras of taal, godsdienstige of politieke strekking, waar alleen maar één enkele voorwaarde bindend is: het eerbiedigen van de Rechten van de Mens.

U.E.A. heeft zich voor de taak gespannen de officiële internationale instanties voor Esperanto te winnen. Dat kan ze niet zonder de steun van elke esperantist, zeker niet zonder voldoende geldelijke steun. Esperantisten zijn geen Cresussen, van de hemelse dauw alleen kan Esperanto niet leven. En daarom past het dat iedereen, naar de mate van zijn middelen, zijn steentje bijbrengt om het grootse werk mee te helpen opbouwen en voltooiën.

Velen beschouwen het hun zedelijke plicht bij de eigen landelijke associatie aan te sluiten, om alzo de groei en de bloei van het Esperanto in eigen gewest mogelijk te maken. En daar doen ze goed aan: zonder hun steun is de beweging tot kwijnen gedoemd. Maar daarmee is het laatste woord niet gezegd: Esperanto is essentieel internationaal, het moet buiten de grenzen reiken of anders heeft het geen zin. En daarom is internationale solidariteit een vereiste die men niet op zij mag schuiven, als het anders kan. U.E.A. heeft meer leden nodig, die door hun bijdrage haar universele actie ook geldelijk steunen.

Die bijdrage is echter niet zuiver een geschenk aan U.E.A.: deze krijgt wel, maar ze geeft ook op haar beurt rijkelijk terug.

U.E.A. compenseert met haar maandblad " Esperanto ", waarin haar leven en streven, haar strijd met zijn wel en wee trouw weerpiegeld liggen. " Esperanto " publiceert staaltjes van het beste wat

er op het gebied van de Esperanto-literatuur wordt gepresteerd. Zijn recensies staan hoog aangeschreven bij de boekenliefhebber. Zijn annonces worden in alle landen gelezen. Graag stuurt het Bureau van U.E.A., Eendrachtsweg, 7, Rotterdam, Nederland, een proef-exemplaar aan wie zich met eigen ogen van de degelijkheid van het tijdschrift wil overtuigen.

U.E.A. compenseert verder met haar " Jaarboek ", dat 400 blz. vult met alle nuttige gegevens over organisatie en werking van de Vereniging en de erbij aangesloten landsbonden. Het bevat daarenboven een uitgebreide catalogoog van wat er voor het ogenblik op de Esperanto-boekenmarkt voorhanden is, en, wat niet zijn kleinste verdienste is: de adressen van ruim 2.000 " afgevaardigden ", over de hele wereld verspreid, die zich belangloos ten dienste van de leden stellen en door hun dienstwilligheid het praktisch nut van Esperanto bewijzen.

De bijdrage voor het lidmaatschap met " Esperanto " en Jaarboek belooft 170 B.F. Een lid met Jaarboek alleen betaalt 85 B.F. Overdreven duur is dat alleszins niet, als men werkelijk iets voor Esperanto is gaan voelen. En zo ingewikkeld is het niet om aan te sluiten. Het volstaat het bedrag van het gekozen lidmaatschap over te schrijven op de postcheque-rekening 4161.35 van F. COUWENBERG, BLANKENBERGE. En alles komt terecht. Tot baat van Esperanto in het algemeen, van U.E.A. en het nieuwe lid in het bijzonder.

Dr. F. C.

se vi parolas pri STROVI... vi pensas pri  
viandâĵejo. se vi pensas pri viandâĵejo... vi  
aĉetas ĉe

**STROVI**

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj:

GARANTIO pri


bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono: pogranda komerco 34559

detala " 33408

**STROVI estas unuaranga!**



### 1. Universeel Kongres te Brussel.

De inschrijvingen voor dit 45ste Internationaal Esperanto-kongres lopen in snel tempo binnen; zijt gij er ook reeds bij? In elk geval zal het comité er voor zorgen dat het kongres een specifieke stempel krijgt in de rij der na-oorlogse kongressen: hiervoor wordt geen tijd of moeite gespaard, en zelfs de typische Esperanto-bedrijvigheid zoals de speciale vergaderingen van de verscheidene "fakaj asocioj" zullen een record-aantal bereiken. Wij wijzen er echter op dat alle betalingen aan Mej. J. Terryn, Raapstraat, 74, Gent (persoonlijke postcheckrekening n° 3309.23) moeten gebeuren. Sedert 1-1-60 bedraagt het inschrijvingsgeld 525 F (min 50 F voor een individueel lid van UEA).

### 2. Bijdragen.

Uit de algemene vergadering van december 59 is gebleken dat de verhoging van de bijdragen niet werd uitgevoerd om sommigen die eventueel de beweging zouden verlaten door deze verhoging, nog te behouden. Van de meeste leden wordt echter verwacht dat zij de steunbijdrage zullen storten, hetzij 150 F.

Bovendien werd er door het bestuur vastgesteld dat verscheidene zeer actieve esperantisten uit onze rangen geen lid zijn van UEA, en dus ook niet in het jaarboek fungeren als delegito of fakdelegito. Gezien de inspanningen die door UEA gedaan worden om Esperanto voor de officiële internationale middens een werkelijkheid te maken, is het lidmaatschap stellig een winstpunt, én voor de beweging, én voor de Esperantist zelf (o.m. door het maandelijks verschijnend tijdschrift "Esperanto").

### 3. Nationale tijdschriften.

Weer is het aan de leden van VEB mogelijk om voor het nieuwe jaar een abonnement aan te vragen op één der nationale Esperantotijdschriften, zoals Franca Esperantisto, Germana Esperan-

tisto, Norvega Esp. Svenska Esperanto-tidningen, e.d. Voorwaarden zoals gewoonlijk, en aan te vragen op het sekretariaat.

### 4. Flandra Esperantisto.

Als laatste nummer verleden jaar is het nummer 5 verschenen, waarbij om de omslag vermeld was "September-Oktober". Dit nummer was het laatste voor het jaar 2959, daar wij op het einde 59 nog zijn overgegaan tot het uitgeven van een Zamenhof-brochure, die in feite als een zesde nummer van F.E. werd beschouwd. De vermelding op de omslag spruit voort uit het feit dat deze bij voorbaat was gedrukt.

### 5. Van de redactie:

Er wordt medegedeeld dat in een volgend nummer de volgende bijdragen zullen verschijnen:

- a. Een bespreking van Virino ĉe la landlimo, van M. Boulton, en van de vertaling van Anne Frank.
- b. Een antwoord van P. Beiszwanger op het artikel: Naturalismo kiel interlingvistiko.

en nog veel meer indien de ontvangsten voor 1960 een verhoging van het aantal bladzijden zou toelaten.

### UNUA LISTO DE SUBTENANTOJ

S-ino A. Meurrens, Leuven - 150 fr. — Frato A. Decorte, Bierbeek - 150 fr. — S-ro L. Paeleman, Herseaux - 150 fr. — F-ino J. Terrijn, Gent - 150 fr. — F-ino B. Cornelis, Aalst - 150 fr. — F-ino P. De Cock, Aalst - 150 fr. — S-ro G. Debrouwere, Kortrijk - 500 fr. — S-ro G. Maertens, St.-Kruis - 150 fr. — S-ro F. Volders, Antwerpen - 150 fr. — S-ro E. De Baets - Berchem (Antw.) - 150 fr. — S-ro F. Roose, Brugge - 150 fr. — S-ro P. Samijn, Roeselare - 150 fr. — F-ino M.J. Top, Veurne - 150 fr. — S-ro Jos. Derks - Monaco - 175 fr. — S-ro H. Vermuyten, Antwerpen - 150 fr. — S-ro C. S. Meeus, Kortrijk - 200 fr. — S-ro V. Jurgens, Ekeren - 150 fr. — S-ro G. Broodcoorens - Eppegem - 150 fr. — F-ino M. Van Mullem, Blankenberge - 150 fr.

### Afd. Leuven

Tijdens de laatste algemene vergadering werd een nieuw bestuur gekozen als volgt:

Voorzitter: de Hr Hubert Boving

Raadgevende: Z.E.H. De Mayer (Wychmaal) en de Hr F. Neefs

Sekretaris: Hr W. Wellekens

Schatbewaarster: Mevr. A. Meurrens

Leden: Mej. M. Saelemaeckers en de Hr M. Piot.

Een cursus werd met succes georganiseerd in de Rijksmiddelbare Jongerschool.

We rekenen verder op U, afdeling Leuven.

## La Homo estas en danĝero kaŭze de sia propra laboro

Ne estas necese montri ke la tekniko revoluciigis nian individuon kaj socian vivon. Etstas pli grave mem preni starpunkton je ĝi, montrante kelkajn fenomenojn venantajn el tiu revolucio.

La tekniko rompĉis ĉiujn niajn tradiciojn. Sufiĉas montri la bildon de antikva urbo toleranta la efikojn de la tekniko, por konsciigi ke la estinteco tutsimple ne ekzistas, en la koncepto de la tekniko. En la pasinteco ĉio kreskis malrapide kaj iom spontane. La tekniko faras nun en 10 jaroj tion por kio antaŭe necesis jarcentoj. La kontraŭradicia spirito de la tekniko forprenas de la homo, kiu kutimis apogi sin je prapatroj, ĉiun apogon en la estinteco kaj puŝas lin al la estinteco kie li havas sian hejmon. La tuta nuna vivo, en la mezuro ke ĝi estas regata de la tekniko, estas faranta planojn kaj estas direktata al la estonteco. Do, oni povus pensi ke la nuna homo estas optimista. Kaj jes tia li estas kie temas pri la amaso sed ne kie temas pri la individuo. Neniu epoko konis tian vivoĝuon, kiu povas manifesti sin en ĉiuj entreprenoj; sed neniu epoko konis pli profundan pesimismon de pensantaj individuoj.

Tiu kontraŭdiro efluas el la al-la-estonto-direktiteco de la tekniko. Tiu estonteco ne karakteras individueca sed areca. Kiom ajn stranga ĝi povas ŝajni, la tekniko ekatakas ĝisfundamente la sendependecon de la individuo. Li tiel dependas de malgranda difekto en la elektrodissendo, kiu donas al li tiom da komforto, ke li tute malaranĝiĝas se ĝi okazas.

Lia tuta ekzisto iĝas dependeco de aliaj, kiuj eĉ decidis pri lia intima vivo. Pensanta individuo, edukita en la revoj de la estinteco, ne kapablas esti alia ol sendirekta en tempo kiun li per siaj malnovaj konceptoj ne kapablas kompreni; kaj tial li emas al pesimismo.

Ĉu li pravas? Sen ia dubo jes. La progreso kaj evoluo de la tekniko eliminis la individuon kaj enŝovas fortefikajn modeligon de la individua vivo eĉ kun standardigitaj sloganoj de persona ekzisto. La plimalfortiĝo de la individuo havas kiel sekvon ne nur la pesimismon sed precipe la malprogreson de prudento. La prudento ne estas specifa kiel la instinkto; ĝi apogiĝas je individueco kaj progresigas ĝin. La teknika progreso faris la instruadon alirebla por la amaso, kiu jes estas edukata, sed kiu ne povas pensi. Cetere la pensado estas tre danĝera en teknika vivo. Kiu sidas je direktilo de aŭto, ne povas pensi, sed devas havi la akomodigintajn refleksojn. Do kun la instruado la tekniko disvastigas la kolektivajn malprudenton, kiu alie povas esti tre efika kaj ankaŭ estas tia. Ekzistas kolektivaj malprudentaj agoj kiuj ekskludas ĉian personan kontribuon, kaj kiuj en sia tuto tamen estas prudentaj. Ekzemple la trafikreguloj, en si mem maldelikataj kaj malprudentaj, ebligas la trafikon kaj estas tial prudentaj. Ekzemploj ekzistas pli ol sufiĉaj.

La kolektiva malprudento kelkfoje havas kiel sekvon politikajn katastrofojn; kio estis la kazo i.a. en Hitler-Germanujo; kaj kio konstante ripetiĝas. Tiu malprudento trovas sian kontraŭefikon kaj dorsapogon en pliiganta burokratigo de la socia vivo. La burokrateco

tute similas al la trafikreguloj: malprudenta en si mem kaj prudenta en la efikoj. Sekvo de la burokratigo estas la progresanta konformismo en ĉiaj formoj, ankaŭ sur tereno de scienco kaj literaturo, kie ĉia persona laboro estas ne-permesata. Ĝi estas ankoraŭ tolerata en detalaferoj tiel ke ankaŭ la scienca esplorado estas atakata de la malprudento. Dua sekvo de la burokrateco estas la pliiganta estingiĝo de la memkonscio, de la meditado, de filozofia meditado. Povas esti ke pli ol iam ajn antaŭe filozofiaĵoj estas legataj, sed oni faras ĝin por akiri ĝeneralan kulturon, kiel iaspecan ornamajon de la spirito, samkiel oni legas difinajn librojn kiuj estas la modo i.a. ĉar ili akiris literaturan premion.

La ĝenerala malprudento kiu estas disvastigata de la tekniko, havas kiel alian sekvon ian indiferecon kiu siavice malplenigas ĉiujn doktrinojn, tezojn kaj religiojn. Tio kio restas de tiuj du lastaj estas iu supra empirismo kun diversaj konkretaj postuloj kiuj ne plu estas subtenataj de principoj. La malnovaj partioj kaj eklezioj rompiĝas. Iliaj anoj ja havas por ili ankoraŭ ian preferon, sed ne plu el entuziasmo, jes el kutimo kaj foje pro tre difinita insisto. Iu persona, mem bone pripensita opinio iĝas pli kaj pli malfacila pro tio ke la organizita malsaĝo laŭ eksterordinare spirita maniero preparas la publikan opinion per gazetaro, radio, filmo kaj aliaj propagandiloj. Estas preskaŭ ne eble eskapi kaj eĉ en landoj kie oni respektas la liberecon de opinioj, kandidato povas akiri per bone organizita propagando 80 % kaj pli de la voĉdonoj. La tiel nomata publika opinio, kiel ĝi manifestiĝas en la gazetaro, estas grandparte mito. Tre malofte oni komunikas gravajn okazintaĵojn ĝuste kaj kun ilia vera fundo. La konscie organizita malsaĝo en la formo de reklamo aŭ propagando, havas kiel celon nuligi personan juĝon, malhelpante la individuon teni distancon inter si kaj la objektoj. Senĉese oni sugestas alli bezonoin tiel ke li ne kapablas agi alie ol la reklamo aŭ propagando ĉin deziras, kvankam tio okazas en plena konscio de libereco. Per tio ĉia propra individua vivo estas malebligata. Oni vivas individue, kiel ĉiu, pro tio ke la propagando ĝin tiel volas aŭ deziras. Entuziasmo estas tie-ĉi ne ebla; jes ia sovaĝa, bolanta furiozo kiu povas akapari amason. Individuo kiu vere al propra sorto estas lasata, enuas kaj ne scias kio pri sia tempo. Efektive la tekniko evoluigis krom la malprudenton ankaŭ persistan intersubjektivan dependecon de tre speciala naturo. La restoracio aŭ kafejo fariĝas la normalaj kunvenejoj de multaj homoj samkiel la kinejoj aŭ sportejoj de spektatoroj. La intersubjektiva dependeco estas ne nur spektakla, ĝi estas ankaŭ tre reala. La tekniko ne povas evolui sen grandaj grupoj en kiuj ĉiuj prenas tre difinitan lokon. La reciproka dependeco de la nunaj individuoj montras jes al nova speco de solidareco sed la okazanta manifestacio de tio estas evoluinta amasspirito kaŭze de kiu ĉiu, plus minus, pensas laŭ sama maniero, sen ke estas necese utiligi ian propagandmanieron.

Ekzistas difinitaj pensoj aŭ opinioj kiuj tre rapide disvastiĝas tra la lando sen ke iu tion reguligis. La primitiva kunligiteco de la tribo komencas nun laŭ konfuziga maniero akapari grandajn komunumojn



kaj detruu ĉian individuan proprecon. La intersubjektiva dependeco kreas mitojn kaj havas mitan karakteron. La nuntempa prefero por la mito, la tuta mitomanio de nia tempo, estas sekvo de la intersubjektiva dependeco.

Al la malprudento kaj al la intersubjektiva dependeco ni devas aldoni la deziron al komforto aŭ al la organizita malvigleco kaj la fataleco. La malvigleco estas konstante plifaciligata de la tekniko. Tiel la pedagogiaj rimedoj estas trukajoj por instrui ion sen vera peno kaj sen vera kono. Ĉio estas farata facile. La filmo ne demandas streĉadon, ne pripensadon, oni nur devas lasi sin drivi. La ĵurnaloj iĝas pli kaj pli simplaj. Eĉ la romanoj estas anstataŭataj per bildoj. La muziko ne postulas penon; ĝi havas simplan ritmon, sen ia profundeco. En iu senco, la abstrakta arto estas bona esprimo de tiu komforto, samkiel la facilema realismo. La malvigleco havas kiel sekvon i.a. lacecon, la plendadon pri streĉado, la emon al ferio kaj nenionfarado. Tamen, ripozo estas ŝanĝo de laboro. En teknika societo tio ŝajnas ne ebla.

Krome, ĉio estas kunligata de premanta neceso kiu, kiel antikva Fato, pendas super la kapo de la hodiaŭa homo. Ĉiu vivas en konscio ke li tamen ne kapablas ŝanĝi difinitan situacion, ke li ne estas necesa kaj ke li estas anstataŭebla. (Jen alia faktoro kiu helpas la individuan pesimismojn.) Fakte ŝajnas ne ekzisti eskap-ebleco al la iro de la historio kaj ŝajnas ke ĝi estas regata de neŝancelebla determinismoj. (En tio O. Spengler, A. Toynbee, P. Sorokin kaj kelkaj Marksistoj inter si ne diferencas) en kiu la individuo ne ludas rolon kaj ne povas ludi rolon. La teknika civilizo, kiel ĝi nun evoluas, estigas determinismon kiu estas pli severa ol ĉiu determinisma teorio kiu ĝis nun estis disvolvata.

**Rim. de la Red. :** La aŭtoro kun kies afabla permeso ni tradukis kaj publikigas tiun-ĉi artikolon, Prof. Dr. L. Flam estas ankoraŭ juna filozofo kaj historiisto. Li laboras multege, publikigas ankaŭ sur literatura tereno kaj havas sinceran kredon ke li helpas al racia klerigado de siaj kunhomoj. Li estas pridiskutita persono ĉar li prenis lokon en la laika humanista movado. Ni ne diras ke ni samepinias kun ĉio kion la aŭtoro tie-ĉi deklaras. Sed tute certe li pensigas kaj montras la danĝeron de ekskluziva teknikismo. Vi povas ankaŭ konstati ke li pensas originale kaj profunde. Estas bone ke niaj gesamideanoj konsciiĝu en kiu tempo kaj en kia homaro ni staras kaj laboras.

## LETERO EL LA SOVJET-UNIO

de nia korespondanto Ivan Ŝavkun en GORKIJ-43

Pr. Kirova 8 - 1 U.S.S.R.

Atente legante esperantaj ĵurnalojn, gazetojn kaj revuojn, oni havas la impreson ke ili pri la Esperanto-movado en la Sovjet-Unio skribas tre malmulte. Fakte, eksterlandanoj scias malmulte pri ĝi. Sed nia movado post la dua mondmilito progresis tre bone en nia lando. Ne nur malnovuloj-entuziasmoj partoprenas ĝin sed ankaŭ junularo. Grandaj esperanto-sekcioj funkcias ĉe la Leningrada Domo de Kulturo, ĉe la Gorkija domo de sciencistoj kaj en aliaj urboj kiel Rostov, Odessa, Kutaisi, Minsk. En superaj, mezaj kaj ordinaraĵoj lernejoj, kluboj, oficejoj, Komsomolaj kaj Pioniraj organizoj aperis multaj rondetoj kaj bone laboras per kursoj. Tre ofte en Sovjeta gazetaro aperas artikoloj pri Esperanto. En la lasta monato pli ol 400. En revuoj kiel "Stelo" el Riga, "Lumturo" el Vilnius kaj en ĵurnaloj de Leningrad Gorkij aperis lecionoj por komencantoj. La Leningrada asocio eldonis du librojn kies aŭtoroj estas Andreev ("Internacia Helplingvo Esperanto") kaj Semenova, Teterin ("Fundamento de Helplingvo Ec.") Baldaŭ aperos de Docento Gruško "Es. en 16 lecionoj". Per leteroj Sovjetaj esperantistoj batalas por paco kaj tutmonda amikeco kaj rakontas pri vivo en Sovjet-Unio. Nur en la lasta tempo la Esperantistoj de Gorkij ricevis pli ol 8.000 leterojn. La en Sovjet-Unio kreitaj "Tutblankrusia —" kaj "Tut-Ukraina Esperanto-Societoj" aliras al fazo en kiu estiĝos la "Tut-Sovjetia Eo.-Asocio" Karaj geamikoj. Mi ŝatus korespondi kun vi. Respondo garantiata.

## Korespondemuloj

el nia ligo: respondu multnombre al tiu alvoko el Rusujo!

KONFITEJO „LA CIKONIO“

G. DENDOOVEN-DERIJCKE

LANGESTRAAT, 52, BRUGGE - TEL. 342.78

SPECIALAĴO DE BAPTO-SUKERO  
LUKSAJ KAJ ORDINARAJ SKATOLOJ

HET WELGEKENDE  
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

**in't duifken**

GROTE KEUS  
IN GERED E KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN  
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS  
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

## Inda Konkludo de la Zamenhof-jaro

Preskaŭ ĉiuj grupoj en nia lando kaptis la okazon de la 100a datreveno de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof, — la 15an de decembro 1959a —, por fari aranĝojn, kiuj estu inda konkludo de tiu granda Zamenhof-jaro, dum kiu, tra la tuta mondo, estis altirata la intereso de la granda publiko sur la grandecon de la figuro de D-ro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto.

En la urboj Bruĝo, Bruselo kaj Antverpeno, estis D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario de U.E.A. kiu, dum rondvojaĝo, prelegis pri tiu granda figuro.

El la prelego de D-ro Lapenna, ni volas ĉerpi, almenaŭ resume, ne la parton historian, kiun ĉiu ja konas, sed la klarigojn, kiujn la oratoro donis pri la kialo de la sukceso de D-ro Zamenhof, tie kie multaj aliaj, — inter kiuj kelkaj veraj gigantoj de la penso, — mal-sukcesis.

Laŭ D-ro Lapenna, la ĉefaj kaŭzoj de lia sukceso estas :

a) **Internacieco kaj universaleco de la celo** : D-ro Zamenhof kreis lingvon, kiu kontentigas la bezonojn ne nur de difinita grupo da nacioj, nek nur por kelkaj sferoj de la vivo, sed plenan lingvon, kiun povas utiligi ĉiuj popoloj de la mondo por sia internacia komunikado. Li kvazaŭ vizie antaŭvidis la vekigon de la popoloj de Azio kaj Afriko, kiuj nuntempe prenas sian lokon en la monda komunajo de popoloj.

b) **Internacieco de la lingvo** : Laŭ sia strukturo kaj vortaro, Esperanto estas ĝis maksimumo internacia kaj tial akceptata kiel propra de ĉiuj uzantoj, tute egale al kiu nacio ili apartenas. La moto « Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas ĝin nomi tia », presita sur la kovrilpaĝo de la Unua Libro, entenas fundamentan principon de unuaranga graveco.

c) **Internacieco de la lingvokolektivo** : D-ro Zamenhof perfekte komprenis, ke lingvo estas socia fenomeno ; ke ĝi devas servi la bezonojn de komunikado kaj pensado de internacia kolektivo ; ke tial nur tiu kolektivo povas esti vere proprietulo de la lingvo kaj evoluigi ĝin konforme al siaj bezonoj. Tial li tuj « forcedis ĉiujn personajn rajtojn » kaj akcente deklaris jam en la Unua Libro : « Internacia Lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia ». Kaj plue : « Mi ne volas esti kreinto de la lingvo, mi volas nur esti iniciatoro ». En la aldono al la Dua Libro (1888) li skribis :

« Ĉio cetera devas esti kreata de la homa societo kaj de la vivo tiel, kiel ni vidas en ĉiu el la vivantaj lingvoj... Kompetenta devas esti de nun, ne la aŭtoro aŭ iu alia persono ; la solaj kompetentaj nun devas esti : talento, logiko, kaj la leĝoj kreitaj de la plej granda parto de la verkantoj kaj parolantoj... La lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj... Mi ne volas eldoni aŭtore plenan vortaron kaj krei laŭ mia persona plaĉo la tutan lingvon de l'kapo ĝis la piedoj... Kiam la lingvo sufiĉe fortiĝos kaj ĝia literaturo sufiĉe vastiĝos, tiam ankaŭ tio, kio estas en mia broŝuro devos perdi ĉian signifon, kaj sole kompetentaj tiam devos esti la leĝoj de la plej-multo ».

Precize tiel la lingvo estis kaj estas konsiderata de tiu internacia kolektivo, kiu ĝin akceptis por sia internacia komunikado. Estas la kolektivo tiu forto, kiu vivtenas kaj evoluigas la lingvon.

d) **Humanisma internaciismo de la idea fono** : D-ro Zamenhof inspiris en la lingvon la ideon de egaleco de ĉiuj nacioj, de internacia frateco inter la popoloj. Tiu idea fono restis la spirita bazo de la lingvo mem. D-ro Zamenhof

ARTMEBLOJ  
KLASIKAJ MEBLOJ

STILMEBLOJ  
MODERNAJ MEBLOJ

# N.V. DE LATTE

Statiestraat, 29 EEKLO

tamen ne supertaksis la rolon de la lingvo tiurilate, kiel kelfoje neinformitaj personoj klopodas kredigi. En Genève, en 1906, li precizigis :

« Ni ne estas tiel naivaj... ktp », ĝis la vortoj « ...de devigata sin altradado » (Originala Verkaro, p. 370).

e) **Internacieco de la literaturo** : D-ro Zamenhof mem tradukis el pluraj lingvoj. Poste aldoniĝis multaj aliaj elstaraj verkistoj, kiuj kreis originale aŭ tradukadis. Tiele, baldaŭ la Esperantlingva literaturo fariĝis vera mozaiko, konsistanta el plej valoraj verkoj kreitaj en diversaj naciaj lingvoj, sed havantaj tutmondan signifon. Al tiu traduka literaturo aldoniĝis verkoj kreitaj originale en Esperanto. Nur unu ekzemplo de la internacieco de la Esperanta poezio : en la verko Esperanta Antologio estis presitaj originalaj poemoj de 90 poetoj el 35 landoj ! D-ro Zamenhof mem estis ne nur la genia iniciatinto de la lingvo sed ankaŭ ĝia unua verkisto kaj poeto. Li estis la bardo de tiu komence mal-granda lingva komunajo, kiu fidis al homeco, restante fidela al siaj nacioj kaj naciaj lingvoj. Estas kompreneble, ke per siaj poemoj D-ro Zamenhof inspiris kuraĝon, paciemon, persiston. La bildoj estas ofte simplaj, mallongaj, la ritmo impresa. Forta ritmo, preskaŭ de taĉmento marŝanta al la venko, sentiĝas en « La vojo ».

Ni kredas ke tiu ĉi argumentado povas, ankaŭ post finiĝo de la Zamenhofa Jaro, kaj speciale en Belgujo, dum la jaro de la 45a Universala Kongreso, esti uzata dum la multaj preparoladoj, kiujn ĉiuj niaj legantoj, preskaŭ devige, havos kun tiuj multaj interesataj, kiuj, okaze de tiu Kongreso, petos al ili klarigojn pri nia movado kaj ties evoluo kaj sukceso.

Ĝi do estu, en la kadro de nia revuo, la konkluda vorto de la Zamenhofjaro.

Via presejo estu

H. De Baene-Sercu

DELAPLACESTRAAT 3  
SINT-KRUIS (BRUGGE)

pro la rapida kaj bonkvalita laboro

## La 45a Universala Kongreso de Esperanto

Ni nun povas informi niajn legantojn ke la Prezidantaro de la Honora Komitato konsistas el:

- S-ro Paul Struye, Prezidanto de la Senato  
Barono P. Kronacker, Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj  
S-ro Gaston Eyskens, Ĉefministro  
S-ro P.W. Segers, ministro de Komunikadoj  
S-ro Pierre Harmel, ministro de Kulturaj Aferoj  
S-ro Charles Moureaux, ministro de Publika Instruado  
S-ro Frans Van Cauwelaert, ŝtatministro, prezidinto de la Ĉambro de Deputitoj  
S-ro Camille Huysmans, ŝtatministro, prezidinto de la Ĉambro de Deputitoj  
S-ro Achille Van Acker, ŝtatministro, eks-ĉefministro  
S-ro J. de Néeff, provincestro de Brabanto  
S-ro Lucien Cooremans, urbestro de Bruselo.

### Invito de la Urbestro de Bruselo

S-ro Lucien Cooremans, urbestro de Bruselo, sendis al la Esperantista mondo la jenan inviton, kiu estas prenita sur la sonbendon, kiu estas ek de nun je la dispono de la grupoj en la mondo, kiu ŝatas propagandi la 45an U.K. aŭdigante al siaj membroj tiun propagandan bendon kiu aŭdigos al ili la voĉojn de la prezidanto de la L.K.K., S-ro Maur. Jaumotte, de la K.K.S. S-ro G.C. Fighiera, kiuj ankaŭ atentigas la esperantistaron pri la granda evento de tiu ĉi jaro:

“La Esperantistoj tra la tuta mondo rigardas nunjare al Bruselo, kiel al la ĉefurbo de la esperanto-movado.

Gastigante la kvardekkvinan Universalan Kongreson de la Internacia Lingvo, Bruselo estas fiera pri la rolo al ĝi rezervita en la kadro de la klopodoj por doni al la popoloj pacon kaj amikecon.

La historio volis ke Bruselo, — krucvojo de latina kaj germana civilizoj —, gastigu popolojn el du etnikaj originoj kaj paroladantan du diversajn lingvojn. Bruselo jam de longa tempo komprenis ke la paca kunvivado ne povas baziĝi sur la hegemonio de unu lingvo, sed sur la egaleco de la lingvoj.

Tiu principo, portita sur tutmonda kampo, montras ke la solvo de la lingva problemo ne povas esti serĉita donante privilegion al unu aŭ al kelkaj lingvoj, sed per justa konvencia elekto, kiu ne ofendu ies sentojn, kiel Esperanto proponas.

Bruselo, kiu en la lastaj jaroj leviĝis ĝis la unuaj rangoj inter la eŭropaj ĉefurboj, larĝe malfermas siajn pordojn al la esperantistoj, kiuj venis el la kvin kontinentoj por kongresi en ĝi.

Ĝi ne nur malfermas siajn grandajn bulvardojn, siajn muzeojn, kie generacioj da artistoj amasigis artajn trezorojn, ĝi ne nur malkovras siajn monumentojn kaj siajn arkitekturojn, sed ĝi malfermas la koron de siaj enloĝantoj por gasta kaj ĝoja bonveno.

Jen la ĉefaj ekstraktoj el la Oficialaj Komunikoj, kiuj estis disvastigataj de la Gazetara Servo de la U.K.:

### Kotizoj:

- Ek de la 1-a de januaro 1960 validas jenaj novaj kotizoj:  
— Kongresano 525,— b.fr.  
— Edzino de kongresano 265,— b.fr.  
— Junul(in)o ne pli ol 20-jara kaj studentoj 185 b.fr.

### Karavanoj:

- Anoncis karavanon:  
— Unuiĝo Esperantista Franca, 34 rue de Chabrol, Parizo, Francujo.  
— Itala Esperanto-Federacio, S-ro G. Grattapaglia, Via Gravere 23, Torino, Italujo.

### Dua bulteno:

Ek de marto 1960 ĉiu aliĝinta kongresano ricevos la Duan Oficialan Bultenon. La 24-paĝa broŝuro, ilustrita, enhavos la provizoran programon de la Kongreso, informojn pri ĉiuj aranĝoj ligitaj kun la Kongreso kaj kompletajn instrukciojn pri loĝado kaj ekskursoj.

### Fakaj kunvenoj:

La esperantistaj fakaj asocioj, kiuj deziras organizi fakajn kunvenojn dum la Kongreso, estas petataj anonci sin ĉe la Kongresa Komitato ĝis fino de januaro 1960.

### Hoteloj:

Jen la provizoraj prezoj por loĝado en Bruselo, inkluzive de matenmanĝo, servoj kaj impostoj:

- Hoteloj:  
Kat. 1 (luksa) ĉ. 270,— b.fr. por tago kaj persono.  
Kat. 2 ĉ. 190,— b.fr. por tago kaj por persono.  
Kat. 3 155,— b.fr. por tago kaj por persono.  
Kat. 4 ĉ. 120,— b.fr. por tago kaj por persono.

En venonta komunikado aperos la prezoj de komuna loĝejo kaj de aliaj loĝkategorioj.

La Loĝiga Servo de la Loka Kongresa Komitato, en kunlaboro kun profesia Vojaĝagentejo, zorgos pri la enloĝigo de ĉiu kongresano, kiu petos tion post ricevo de la Dua Bulteno.

### T.E.J.O.-Kongreso:

La 16-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo okazos en Rotterdam de la

23-a ĝis la 30-a de julio 1960 en la komunuma konferenĉejo «De Tempel»: Kotizoj por membroj de T.E.J.O.: malpli ol 20-jaraj - ĝis 1.4.1960 ned. ĝid 70,—; ĝis 1.7.1960 ned. ĝid. 75,—. Pli ol 20 jaraj - ĝis 1.4.1960 ned. ĝid. 75,—; ĝis 1.7.1960 ned. ĝid. 80,—.

Nemembroj de T.E.J.O., devas pagi ned. ĝid. 4,— plie. Ĉar la nombro da lokoj en la Konferenĉejo estas limigita, frua aliĝo estas konsilata.

Provizora programo: Interamikiĝa vespero, solena inaŭguro, kongresa balo, tuttaga ŝipekskurso, duontagaj ekskursoj (unu per ŝipo kaj unu per aŭtobuso), vizito al la internacia ekspozicio «Floriade», kulturaj prelegoj (kun partopreno de eminentaj esperantistoj), oratora kaj sporta konkursoj, solena fermo.

**Protektanto:** D-ro W. Drees, estinta ĉefministro kaj nuna honora ministro de Nederlando akceptis esti honora protektanto de tiu kongreso.

**Kongresejo:** La Kongresejo de la 45-a Universalan Kongreso estos la tute nova Palaco de Kongresoj de Bruselo, kiu situas sur la monteto de Belaj Ar-

**Babywereld**  
**KINDERWAGENS**  
**DIEPESTR. 44**  
**ANTWERPEN-TEL.32.44.30**

Alles voor de  
Hygiene en het Com  
fort van uw Baby  
Het mooiste speelgoed

Esperantistoj ĝuas rabaton.



toj je 100 m. de la centra stacidomo en la koro de la urbo. En la kongresejo troviĝas modernaj kaj funkcicelaj salonoj por la kongresaj servoj kaj laboroj, kafejo-restoracio kaj poŝtofiĉejo. Antaŭ la konstruaĵo etendiĝas plaĉa kaj ripoziga parketo, gracie ornamita per artaj akvoŝprucoj.

**Senpagaj vojaĝoj al Bruselo** : Unuiĝo Esperantista Franca lotumos unu senpagan vojaĝon al la Universala Kongreso inter siaj membro-apogantoj. La Pariza Federacio de Unuiĝo Esperantista Franca decidis asigni alian senpagan veturadon kaj restadon al Bruselo al instruist(in)o el la eksperimentaj kursoj en Versailles, kies klaso havas la plej bonajn rezultojn.

**Fakkunvenoj** : Anoncas Fakkunvenon :

Skolta Esperantista Ligo pri : « Kiel solidigi la ĝisnunajn atingojn ? ». Adreso : S-ro J. Van Gulck, Wolfjagerslei 40, Borgerhout (Antverpeno), Belgujo. Universala Ligo, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Adreso : F-ino V.C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Birmingham 30, Britujo.

Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj pri : « La pozicio de advokato en diversaj landoj ». Adreso : S-ro Sven Ziegler, Bjernedevej 62, København Brh. Danlando.

**Senpagaj vojaĝoj** : La Esperantista Societo de Marseille disponigas du senpagajn veturadojn kaj partoprenojn en la Universala Kongreso kiel premion por siaj plej bonaj kursanoj.

**Komunaj Loĝejoj** : La Loĝiga Servo de L.K.K. organizis taŭgajn komunajn loĝejojn je prezo de 45,— b.fr. por persono kaj por nokto, inkluzive de manĝaĵo.

**Bankedo** : Antaŭ la Kongresa Balo okazos en la Madalenaj salonoj komuna festa bankedo kun orkestra muziko.

**Afiŝo** : La Centro de Informado de la Urbo Bruselo decidis eldoni turisman afiŝon, cm. 60 x 100, en Esperanto. Lokaj esperantistaj societoj aliĝintaj al Landaj Asocioj povas ĝin ricevi mendante ĉe : 45-a Universala Kongreso de Esperanto, Bruselo.

#### Cseh-seminario :

De la 27-a ĝis la 30-a de julio 1960 S-ro Cseh persone gvidos en Bruselo (Reĝa Ateneo en plena centro de la urbo) Internacian Seminarion por Cseh-metodaj Esperanto-instruistoj. Kotizo 10,— gld. (40 steloj). Informoj kaj aliĝoj ĉe Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag.

#### Infana kongreseto :

La 5-a Internacia Infana Kongreseto okazos dum la Kongresa semajno en la moderna konstruaĵo de la Lernejo por Mastrumado kaj Agronomio (situata tuj post la Brusela Mondekspozicio). La partoprenado estas severe rezervita al infanoj inter 6 kaj 13 jaroj, kiuj efektive parolas Esperanton.

#### Prezoj en Restoracioj :

En brusela restoracio oni povas ricevi tagmanĝon ek de 25,— b.fr.

### ESPERANTISTA FREMDULTRAFIKA SERVO :

1. — Rezervas Hotelĉambrojn por individuoj kaj karavanoj. (ankaŭ modesta tranokto).
2. — Prizorgas gvidadon kaj informojn.
3. — Sendas turistajn prospektojn.
4. — Sorĉas kunlaborantojn kontribuitajn.

**Direkcio** : R. LOECKX, Konijnenperken, 109, Bruselo 17 (Belgujo).  
F.D. U.E.A.  
Tel. Bruselo 72.32.22 (1 Rpk. m.p. por korespondaĵo).

La direktoro de la konstruaĵo "Het Internationaal Zeemanshuis", S-ano Sielens H., gvidis la ĉeestantojn tra la bela kaj komforta marista domo ; tiel estis la komenco de la ĝenerala jarkunveno en Antwerpen, la unua postmilita en tiu-ĉi urbo. Ni dankas Sron Sielens pro lia afableco.

Kelkaj novaperintaj libroj estis ekspoziciataj, kaj la libro-servo povis noti multajn mendojn.

Iom post la tria, S-ro Debrouwere, Prezidanto, malfermis la kunvenon : ĉeestis delegitoj de Antwerpen, Blankenberge, Brugge, Kortrijk, Gent, Londerzeel kaj Mechelen. Ankaŭ S-ro Beckers, Prezidanto de IKUE honorigis nian jarkunvenon per sia ĉeesto.

La diversaj punktoj estis pritraktataj laŭ la fiksita ordo, el kiuj ni ĉerpas la plej interesajn :

1. Kotizoj restas samaltaj, sed la sekretario instigis al pago kiel subtenanto (150 F) ;
2. Instigo por aliĝo al UEA ;
3. Sekcio Mechelen estis invitata prezenti kandidaton por la estraro ;
4. La ses eksciĝintaj estraranoj, estis reelektataj ;
5. Nederlandlingvaj artikoloj estas dezirindaj, se la teksto povas interesigi la **anojn kaj eksterstarantojn**.

Post la kunveno, almenaŭ post la oficiala fermo, S-ro Vermuyten de Antwerpen aŭdigis de li mem kunmetitan magnetofonbendon sed, bedaŭrinde, multaj samideanoj daŭrigis la interdiskutadon, tiel ke nur malgranda aro eksciis la enhavon. Tia oni petis al S-ro Vermuyten disponi la bendon por niaj grupaj kunsidoj, kaj tiu propono estis akceptata.

Kaj ĉiuj kontente hejmeniris.

Vere, la Antverpena atmosfero tre taŭgas por jarkunveno de Flandra Ligo Esperantista.

M. G.

### Atentu - Atentu - Atentu

#### „Memorlibro pri la Zamenhofjaro“

U.E.A. eldonos ĝin en la printempo de 1960. Ĝi enhavos la plej valoran materialon publikigitan okaze de la naskiĝjaro de Zamenhof ; kaj ampleksan raporton pri la okazintaj celebradoj en la mondo. La kunlaborantoj garantias elstarajn artikolojn : W. Auld, M. Boulton, Prof. G. Waringhien, Prof. Dr. Lapenna, k.a. La libro estos elegante bindita kaj tre riĉe ilustrita per multaj, ankaŭ nekonataj fotoj pri la vivo de la Majstro.

*Antaŭmenda prezo : 9 guld.*  
Ni varme, varme rekomendas.

## LA PRAKTIKO

Se en antaŭaj kronikoj ni kun sento de fiero laŭdis la "Norda Prismo" kaj "La Nica Literatura Revuo" pro ilia altstara kultura nivelo, ni kun sama sento de fiero povas nun laŭdi alian revuon pro tio ke ĝi estas multlilate ideala revuo: "La Praktiko".

Unua kvalito: ĝi estas la revuo kiun ni uzas por propagandi. Efektive neniu alia estas tiel belespekta kaj tiel riĉe ilustrita. Aldonu ke ĝi estas grandformata; kaj jen vi havas ĉion por altiri la atenton kaj do por fari propagandon per ĝi. Dua kvalito: ĝia enhavo estas tre varia: konkursoj; korespondanconoj; "la mondo ridas"; "panoramo" kun diversaj eksterordinaraĵoj; bibliografio; la lastaj venkaj lingvo estas relative simplaj; cetero troviĝas rubriko: lernu per la Trie ĝi estas tre taŭga por ne ankoraŭ spertaj esperantistoj ĉar stilo kaj lingvo estas relative simplaj; cetero troviĝas rubriko: lernu per la eraroj. Kaj kvare, ĉiujfoje ĝi enhavas almenaŭ unu grandan artikolon pri interesa temo. Mi volas citi nur kelkajn. "Jericho, la plej malnova urbo" (aprilo '58) "La sekretojn de la Saharo" (okt. '58) "Profetita Vivo" (pri la Dalai-Lamo en nov. '58). En la sola decembra numero '58: "La Profeto de la Moderna Mondo" (pri Jules Verne) "El la Bildolibro de la Kristnasko" (en la arto) kaj "Brasilia: la nova ĉefurbo de Brazilo" (ĉiuj riĉe ilustritaj) "Honoron al Konfucio" (feb. '59) "Blanka virino inter la kapĉasistoj de Ekvadoro" (apr. '59) "La Urbo ĉe la Sala Lago" (Majo '59) "Andorra" kaj "La monumenta arto en antikva Egiptujo" (ambaŭ en Julio-Aŭg. '59) Kaj, ĉiujfoje ampleksa raporto pri la universala kongreso kun multaj grandformataj fotoj. Ĝi havu tre longan vivon kaj varbu multegajn abonantojn.

---

### Angulo de la Kasistino

*La kasistino dankas ĉiujn kiuj jam repagis sian kotizon por 1960 kaj speciale la multajn subtenantojn*

*Peto: bonvolu pagi kiel eble plej baldaŭ ĉar kelkajn tagojn post rioevo de la jena estos sendataj kvitancoj per la poŝto. Tuj pagante vi evitos la krompagon por ĝi. Koran dankon*

---

### Atentu

*Pagojn por la Ligo faru je P.C. 2321.50 de  
Vlaamse Esperantisten Bond  
Raapstraat, 74 GENT*

*Pagojn por la Universala Kongreso faru je  
P.C. 3309 23 de  
J. Terrijn  
Raapstraat, 74 GENT*

*Atentu ankaŭ ke ek de Aprilo la kotizo ree plialtiĝos.*

## LA VOĈO DE AMERIKO DISSENDOS RADIO-PROGRAMOJN EN ESPRANTO.

La Voĉo de Ameriko, la tutmonda radio-servo de la usona registaro, decidis dissendi eksperimentan serion da programoj en Esperanto, komencante la **11-an de Marto 1960**. Oni preparas 6 programojn 30-minutajn kun tre varia enhavo: intervjuoj, diskuttrondoj, raportoj pri kulturo, literaturo, ekonomio, scienco, tekniko kaj la eksterlanda politiko de Usono, novaĵoj el la Esperanto-movado, "Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko". La programojn direktas D-ro Willim Solzbacher, Membro de la Akademio de Esperanto, en kunlaboro kun fakuloj kaj eminentuloj usonaj kaj eksterlandaj.

En 6 sinsekvaj semajnoj ĉiu programo estos dissendata **trifoje ĉiun vendredon**, je 11.00, 12.00 kaj 22.00 h. laŭ la horsistemo de Greenwich. La tria sendo, sur la ondlongoj de 31.28 m (9590 kcs) kaj 30.74 m (9760 kcs), devus esti bone aŭdebla en Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Azio kaj Afriko (je la 10-a vespere en Britujo, Portugalujo kaj Maroko, la 11-a en la plimulto de eŭropaj landoj. La programoj estos aŭdeblaj ankaŭ en aliaj partoj de la mondo.

La Voĉo de Ameriko decidis laŭ la spertoj kaj rezultoj de la eksperimenta serio pri eventuala regula uzado Esperanto. Raportoj pri la ricevo de la programoj, rimarkoj pri la enhavo kaj demandoj respondotaj en la rubriko "Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko" estu adresataj al D-ro W. Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528 HEW, Washington 25, D.C., Usono. Sendinto de demando por "Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko" laŭeble ricevos antaŭan informon pri la tago, kiam la respondo estos donata antaŭ la mikrofono.

---

Frato Arni Decorte de la Fratoj de la Karitato festos la 23an de Aprilo 1960 sian arĝentan religian jubileon. Samtempe li estas esperantisto de 15 jaroj.

Adreso: Fr. Arni Decorte, Instituto Sankta Kamilo, Korbeek-Lo (Leuven) Belĝio.

---

### Korespondanconco:

*Ĵos. Vild, profesoro, Rokycany 116/II Ĉeĥoslovakio deziras interŝanĝi ŝtampitajn poŝmarkojn kaj alumetvignetojn.*



## Enigmoj...

La presisto lastfoje bedaŭrinde eraris ĉe la difinoj sub 7 horizontale de la krucvortenigmo. Ni pardonpetas pro tio. Malgraŭ tiu eraro ĉiuj gepartoprenintoj al la konkurso tamen sukcesis ensendi korektan solvon. La ranglisto nunmomente estas: S-ro Vande Velde 49 1/2 p. — Frato Feliciano 40 p. — S-ro Miny 35 p. — F-ino Van Mullem 35 p. — S-ro Couwenberg 25 p. — S-ro Hinderyckx 24 1/2 p. — Frato Basilianus 15 p. — Frato Arni 12 1/2 p. — S-ino Meurrens 10 p. — S-ro Beiszwanger (Germanujo) 10 p. — S-ro Volders 10 p.

La substrekitaĵaj personoj jam gajnis libropremion kaj tiam rekompencis la konkurson je 0 p.

### NOVA TASKO — CIFERENIGMO

La solvo konsistas el 85 literoj kiuj estas numeritaj de 1 ĝis 85. Je akzakta solvo vi legos pravan eldiron de la Sveda diplomato kaj poeto SNOILSKY. La literoj estas troveblaj helpe de la sekvantaj ŝlosilvortoj:

- 15 - 43 - 3 - 68 - 8 - 4 - 22 - 59 - 66 - 68 = aviadilaj akrobataĵoj  
37 - 85 - 56 - 70 - 33 - 80 - 49 - 43 - 20 - 82 = korda muzikinstrumento  
48 - 13 - 35 - 1 - 65 - 55 - 33 - 80 - 25 = ormonero de la antikvaj Per-soj  
63 - 2 - 11 - 67 - 56 - 83 - 9 - 50 - 16 - 23 - 26 - 62 = dubraka ilo por preni brulantan materion  
5 - 18 - 46 - 69 - 79 - 78 - 68 = laboro el familio de oleacoj kun bonodoraj floroj  
6 - 21 - 83 - 30 - 9 - 52 - 58 - 27 - 31 - 81 - 54 = ĥirurgia malfermo de la ventra pario.  
48 - 40 - 26 - 34 - 33 - 80 - 38 - 46 - 12 - 82 = nekapablo de ĝusta kolorperceptado  
51 - 77 - 66 - 75 - 31 - 75 - 8 - 29 - 84 - 25 = vapormotoro provizita per radoj por sin movi sur vojoj  
42 - 40 - 16 - 64 - 52 - 39 - 73 = trudpostuli de iu monon aŭ favoron per skandalminaco  
61 - 15 - 31 - 47 - 76 - 32 - 8 - 67 - 13 - 16 - 1 - 27 - 57 = klaso de moluskoj kun duvalva konko kaj kies granda ombro estas manĝebla.  
40 - 19 - 24 - 10 - 9 - 7 - 17 - 4 - 74 - 82 = spirita povo, bazita sur plenfidindaj kvalitoj.  
28 - 45 - 49 - 60 - 35 - 33 - 78 - 62 = gvidisto por fremduloj  
53 - 32 - 41 - 72 - 3 - 73 - 36 - 80 - 62 = burleskulo amuzanta la publikon per vulgaraĵaj komikaĵoj.  
14 - 65 - 44 - 57 - 71 - 24 - 18 - 78 - 25 = timinda monstro.

**Rimarko:** 1. por ekzakta solvo 10 p.

2. solvoj sendotaj al la prizorganto de la rubriko: Roger ISERENTANT - Blankenbergse steenweg, 72 - Brugge.

## Recenzoj

Gaston WARINGHIEN: "Lingvo kaj Vivo" (Esperantologiaj eseoj) eldonis "Stafeto" de Juan Regulo Perez en La Laguna Tenerife sur la Kanariaj Insuloj. 1959. 452 paĝoj. Prezo: 3,40 Us.Dol. tolbindita ekz.: 4 Us. Dol. plus sendkostoj.

Tiu nova, valorega eldono konsistas el serio de artikoloj kaj konferencoj kiuj datumas de 19 ĝis 1957, sed preskaŭ ĉiuj reverkitaj. En la "Preludo" la klera aŭtoro prave montras la nekompreneblan kaj malseriozan sintenon de preskaŭ ĉiuj filologoj rilate al Esperanto. Dum ke ili arde kaj kuraĝe faras adajn esplorojn pri ĉiuj, ankaŭ plej primitivaj lingvoj, Esperanto ŝajne lasas ilin tute indiferecentaj kvankam Esperanto estas ne nur interesa sed ankaŭ unika lingva fenomeno. La kaŭzo de tio? La aŭtoro ne klarigas. Mi pensas ke grandparte ĝi kuŝas en antaŭjuĝoj kaj en intelekta malhumileco. La plimulto de la erudiciuloj estas homoj kiuj ne konservis sanan racion kaj iĝis misformitaj de iliaj studoj. Mi povis ankaŭ konstati kiel malhumilaj ili estas kaj, trie, enviemaj unu je la alia. Ili ne kapablas rezisti la tenton por diskreditigi samfakulojn. Eble ludas ankaŭ rolon la timo ke, okupiĝante pri Esperanto, ili donus sufiĉajn motivojn al aliaj por mokridi.

Jen la materialo pritraktita. Unue la Zamenhofaj provoj antaŭ la definitiva Esperanto; kun tekstoj. Poste Waringhien etimologie esploras lingvopartojn, precipe afiksojn. Tiu parto estas tre interesa por kursgvidantoj kiuj instruas al studentoj. Troviĝas tie sur paĝo 63 preseraro kie la Greka vorto "eklegan" devas esti "ekgelan". Ricevas tiam sian vicon la Fundamento kies historia aspekto estas pristudita kaj poste la vortkonstrua signifo; en kiu ĉapitro la aŭtoro prijuĝas la derivad-sistemon kaj la kategoriecon de la esperantaj vortradikoj. Poste li pritraktas la originalan strukturon de Esperanton en vorto kaj frazo. Ĝis nun ĉio povas pasi sen multe da kontraŭdiro. Sed nun venas iom tikla ĉapitro: la akuzativo en Interlingvistiko. Kial precize nun la atento streĉiĝas? Ĉar multaj atakas Esperanton pro tiu akuzativo; kaj ĉar ne malmultaj esperantistoj opinias ke ĝi ne devas ekzisti. Unu de iliaj argumentoj estas ke en pluraj naciaj lingvoj ĝi ne plu ekzistas. Sed, ĉu pro tio tiu lingvo iĝis pli klara kaj pli facila por... alilingvanoj? Jen la grava afero. G.W. montras unue la akuzativon en la naturaj lingvoj; poste li preparolas la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de akuzativo kaj, laŭ mi, konvinkite montras ĝian necesecon kaj la malklarajojn en la naciaj kaj planlingvoj kie tiu formo ne ekzistas. (La ekzemplo en Occidental estas frapa. Paĝo 139.) Se do ĝiaj dezirindeco kaj neceseco en kazo de rekta komplemento estas evidentaj, mi ankaŭ kredas ke ĝi ankaŭ estas necesa por montri la direkton kaj tiel povi distingi inter celo kaj pozicio de movo. Sed! Granda sed. Restas la faktoj, unue ke tre multaj kursanoj spertas malfacilaĵojn kun tiu akuzativo kaj sekve faras erarojn tiurilate, kaj due, ke pluraj verkistoj uzas ĝin kie ne necesas. Kaj la sekvo de tio lasta estas ke tiam novuloj uzas ĝin kie ne povas! Kaj finfine multaj ne plu scias kiam precize akuzativo necesas kaj kiam ne. Mi donas



ekzemplojn. Kial skribi: "meti monon en la poŝon" konsiderate ke ne povas ekzisti dubo pri la senco? Ĝi estas evidente de el la poŝo al en la poŝo. Mi konsentas kun Waringhien ke oni ne donu liberecon pri uzo aŭ ne-uzo, ke tiu libereco estigus konfuzon kaj konfuzigon; sed nur en kazoj de rekta komplemento. Tie ĝi devas esti uzata ankaŭ se la vortordo kaj la kunfraz(ar)o ne lasas dubon. Sed kie oni havas frazon kun prepozicioj, ni estu atentemaj ke ni uzu nur en kazo de strikta neceso. Alie, haoso estiĝos en la kapo de multaj kaj en ilia lingvo. Tial mi juĝas tute ne pravigebla la frazon: "... la atingajoj estu diskonigataj en la tutan rondon" (Brita Esp. dec. 59 paĝo 165). Direkta por ni estu kion Zamenhof mem skribis en la "Lingvaj Respondoj" (dua eldono; p. 40) ke la akuz. estas enkondukita nur el neceso.

Post tiuj studoj, iĝis necese iom ripozi kaj distri. Kaj tion W. faras per "Interludo" kie li pritraktas la etimologion de diversaj personaj nomoj.

En la dua parto de la libro G.W. pristudas "niajn problemojn". Kvazaŭ la akuzativo ne estus problemo? Certe por tre granda nombro de esperantistoj se ne por la spertuloj. La unua estas la landnoma problemo. Temas kompreneble ĉefe pri -ujo -io. Mi ne konsentas ke ujo estas tiom diverssenca. Ĝia ĝenerala senco ja estas enteno. Mi jes kredas ke ĝis nun ne ekzistas la rimedo (j) por solvi ĉiujn tradukmalfacilaĵojn rilate la landnomojn. La aŭtoro pritraktas ankaŭ la internacian kaj politikajn aspektojn; tre interese!

(daŭrigota)

## Grupa Vivado Afdeling GENT:

Door bemiddeling van ons lid dhr. H. Vermeersch, werd door BOLTS (Bond der Oudleerlingen van de Technische Scholen) een spreekbeurt ingericht, bedoeld als kennismaking met Esperanto. Als spreker trad op Dro F. Roose, Ondervoorzitter van Flandra Ligo.

De vaardige redenaar bewees, aan de hand van concrete voorbeelden, hoe broodnodig Esperanto is voor onze huidige samenleving zowel op economisch als op kultureel en toeristisch plan.

Dat de toehoorders werkelijk geboeid waren bewees de duidelijk te lezen spanning van hun gezichten gedurende de twee uren lange voordracht. Hun verbazing steeg echter ten top, wanneer dhr. Roose, als een behendig goochelaar, tal van rijkgeïllustreerde Esperantotijdschriften en boeken uit zijn tas te voorschijn toverde.

Het was dan ook met een welgemeend entoeziasme, dat de heer Van Auwerghem, Voorzitter van BOLTS, zich bereid verklaarde mee te werken aan de verspreiding van Esperanto en af en toe korte berichten over de Esperantobeweging in het Bondsblad op te nemen.

Afdeling Gent, dankt zeer hartelijk Dro F. Roose voor zijn geslaagde spreekbeurt en zijn sympathiek optreden.

A. V. d. V.

Sekcio Gent konigas ke ĝi ne plu kunvenas en „Colombophile” sed en Milkbar 't zuid. Graaf van Vlaanderenplein, 10.

la kondiĉoj estas la plej profitaj  
kaj la servoj la plej personaj ĉe



tio estas la sekreto  
de ĝia rapidega progreso

Asocia sidejo: ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

Firma Van Iseghem & Verstraeten,

P.V.B.A.

ST BERNARDSE STEENWEG, 631 HOBOKEN

VITRALOJ - SPEGULOJ - „SECURIT” VITRO  
KOLORIGITAJ VITROJ  
ALUMINIAJ SENMASTIKAJ STANGOJ POR  
KUPOLOJ

VITRO-CEMENTO POR TUTVITRA-KONSTRUAĴOJ  
MASTIKO

telefoon 37.88.20

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54

221654

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ  
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko  
la perfekta konfekcio  
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj  
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	:	Aalmoezenierstr. 17 Abdiestr. 57 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87
Arlon	:	Marché-aux-Légumes 16
Brugge	:	Breidelstr. 8
Brussel	:	Galerie d'Ixelles 9 Bd. Anspach 194
Eupen	:	Kirchstr. 14
Gent	:	Brabantdam 25
Herstal	:	Rue Large Voie 4
Leuven	:	Bondgenotenlaan 49
Luxembourg	:	Place de la Gare 67
Roeselare	:	Ooststr. 124
Tournai	:	Rue Royale 75
Turnhout	:	Herentalsstr. 6
Verviers	:	Pont St. Laurent 2